# Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

JARKOLEKTO
JAARGANG 4 N° 3 DEC. 1984

FEL ESTRARO DEZIRAS AL ĈIUJ MEMBROJ KAJ ILIAJ PARENCOJ KAJ AMIKOJ ĈION BONAN POR LA NOVA JARO, PRECIPE BONAN SANON, PROSPERON, FELIĈON KAJ SUKCESON EN ĈIUJ ENTREPRENOJ.

ATENTINDAĴOJ :

LA VENONTA ESTRARKUNSIDO DE FEL OKAZOS JE SABATO 6-A DE JANUARO 1985 KIEL KUTIME EN ESPERANTODOMO, ANTVERPENO.

## GAZETARA SERVO

ĈU VI NE FORGESAS ENSENDI VIAJN KUNTIRBUAĴOJN AL HERMAN KAJ ANNIE ?
VI SCIAS, TEMAS PRI ELTONDAĴOJ, LETEROJ KAJ REAGOJ DE AŬ AL LA GAZETOJ.
DANKON PRO LA KUNLABORO.

I N F O R M I L O . Kadrogazeto de FLANDRA ESPERANTOLIGO
Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN
Telefono 03/234 34 00
Jarabono : BF 150,- Kontoj : 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43

---

| | | |
|---|---|---|
| Prezidanto : | Ivo DURWAEL, Paul Gilsonlaan 5<br>2520 EDEGEM | 03/440 30 92 |
| Sekretario : | Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14<br>2510 MORTSEL | 03/449 50 06 |
| Financoj : | Erik D'HONDT, Wilgstraat 25 A<br>9440 EREMBODEGEM | 053/77 44 97 |
| | Paul PEERAERTS, Baron Dhanislaan 13<br>2000 ANTWERPEN | |
| Informado : | Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 62 66 |
| Intergrupa agado : | Hilde VAN INGELGEM, Arbeidstraat 21<br>9300 AALST | 053/70 50 11 |
| | Trees DOOMS, Baron Dhanislaan 13<br>2000 ANTWERPEN | |
| Junularo : | Kristin TYTGAT, St. Hathebrandstraat 8<br>2510 MORTSEL | 03/449 50 24 |
| Kadrokursoj : | André STAES, Jan Denucéstraat 1/198<br>2020 ANTWERPEN | |
| Literaturo/eldonoj | Christian DECLERCK, Amerikalei 135/2<br>2000 ANTWERPEN | |
| Gazetara servo : | Herman k. Annie DECEUNINCK-BOLLAERT<br>Lusthuizenlaan 1 b. 4, 1500 HALLE | 02/360 17 22 |
| Sciencoj : | Wim DE SMET, Hertendreef 12<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 99 49 |

Provincaj respondeculoj :

| | | |
|---|---|---|
| Brabanto : | M. Th. HENQUINEZ<br>Lipsestraat 166, 2991 TILDONK | 016/23 61 90 |
| Limburgo : | Guido SCHROEYERS<br>Helzoldstraat 113, 3558 HELCHTEREN | 011/53 64 10 |
| Okc. Flandrujo : | vakas | |

---



# P R O T O K O L O

pri la estrarkunsido de sabato 8-a de decembro 1984 en Antverpeno

Ĉeestas : Ivo DURWAEL (ID), Erik D'HONDT (ED), Paul PEERAERTS (PP)
Hilde VAN INGELGEM (HVI) kaj Jan BOVENDEERD (JB)

Petis senkulpigon : Edward SYMOENS (ED) kaj Jules VERSTRAETEN (JV)

Komenca horo : 10.15 h.

1. La protokolo pri la estrarkunsido de 03 11 84 estas aprobita, krom jenaj rimarkoj :
   Punkto 6 alineo 2-a : Bv. legu :
   " BEFA estas interesita en kunlaboro en Esperanto-aranĝoj (interŝanĝo)."

2. ID anoncas ke li verŝajne rekontos S-inon Rika DE BACKER, eksministro pri kulturo, je 17 12 1984.
   Tial li preparis memorandon rilate al niaj aktivecoj.
   Renkontiĝo kun respondeculo de la kultura konsilantaro de la Provinco Antverpeno estas antaŭvidita en januaro 1985.

3. VOJAĜOJ - TRANSPORTADO

3.1. TAKSI STOP
ID denove surtabligas la proponon pri esplorado de la eblecoj krei servon kiel "TAKSI STOP".
Tio povas esti interesa i.a. por Esperanto-renkontiĝoj, kongresoj k.s.
Multaj aŭtomobiloj neplenaj vidiĝas je tiuj okazoj, ofte el samaj lokoj.
Devas esti eble pli racie uzi tiujn transportrimedojn, je por ĉiuj interesaj kondiĉoj.
Kiel aranĝi tion ? Eble per unu centra persono ?

3.2. VOJAĜOJ
FEL povus funkcii kiel vojaĝperanto por iu vojaĝagentejo, ekz. okaze de Universala kongreso.
Temas ne nur pri transportado (vidu 3.1.) sed ankaŭ pri tranokteblecoj.
ID jam havas kelkajn planojn, sed preferas pli detale pritrakti ilin post renkontiĝo kun respondeculo de VTB/VAB, je merkredo 12 12 1984.
Intertempe ni trovu personon kiu pretas okupiĝi pri tio.
ED esploros tion kaj raportos pri siaj klopodoj.

4. KOSTONOTOJ

ED preparis uniforman kostonoton destinitan al la ministeriaj servoj kadre de la subvencidosieroj. Ĝi estu do nederlandlingva.
Decidiĝas, krom tiu kostonoto, plu-uzi la kvitiĝon, kiun uzas jam de kelkaj jaroj JB, sed por internaj kosto-kalkuloj.
La diferenco inter la du estas jena :
- la oficialaj kostonotoj servas nur por elspezoj
- la kvitiĝoj permesas reguli kaj en- kaj elspezoj (pere de kompensado).

5. NOVAJ KURSANOJ.

JB - Ĉu novaj kursanoj ricevos, kiel antaŭe, ESPERANTO PANORAMA-n eĉ se ili ne aliĝas al FEL.
Jes, principe dum unu jaro.

6. LIBROSERVO

6.1. Evidentiĝas ke niaj propraj eldonaĵoj ne vendiĝas tiel facile kiel ni esperis. Ĉu ni sufiĉe reklamis ilin ?
Decidiĝas pli bone prizorgi la reklamadon, ĉefe de niaj propraj eldonaĵoj tiel pere de ESPERANTO PANORAMA kiel de LIBROVERMETO.

6.2. PRISMA VORTARO
Nenio nova. Ĝi ankoraŭ ne estas preta, kvankam anoncita antaŭ kelkaj monatoj.

6.3. FAKTURADO
Por eviti apartajn sendokostojn PP kaj ED esploras la eblecon aldoni la fakturojn tuj al la libroj ĉe ilia livero. Tio fakte permesas ŝpari la afrankon de aparta alsendo (BF 12,-)

6.4. FESTKANDELOJ
Festkandeloj estas ankoraŭ haveblaj je po BF 100,- kaj BF 20,-
Proponite estas produkti, se ne plu eble nunjare, venontjare kandelojn en pliaj koloroj ol nur verda kaj blanka.

6.5. LETER-PAPERO
PP petis novan projekton al la desegnisto, sed ankoraŭ ne ricevis.
Tamen ekzistas bela leterpapero al kiu sufiĉus aldoni ekz. verdan stelon.
Por ke la presado ne estu tro multekosta prikonsiderate estas produkti ĝin en unu koloro : la verda.

6.6. REVUOJ
PP proponas ke FEL peru ĉiujn revuojn kaj tiel plibonigi la servon al la membroj.
Fakte temas vera servo al la membraro, kiu tiamaniere do bezonas reteni plu unu solan adreson por ĉio kio koncernas Esperanton.
Eĉ se tio ne donos tujan gajnon, finfine tio devos favore influi nian agadon.

6.7. Laŭ indikoj de ES, la libro de Cl. Piron estas tradukita. ES tamen opinias ne oportune aldoni la kontraŭargumentojn sen respondoj.



7. KOLOKVOJ

7.1. La tekstoj de la du unuaj kolokvoj estas nun pretaj por multobligado.
JB informiĝos ĉe Marc DEMONTY kaj André MERTENS-GOOSSENS, gvidantoj de KLUBO 100 :
a) ĉu la kostoj povos eniri la konton de KLUBO 100
b) kiom da ekzempleroj estos bezonataj
c) ĉu la tekstoj estu jes aŭ ne senpage disponigotaj al interesitoj.

7.2. ES proponas por januaro/februaro 1985 trian kolokvon pri :
" PSIKOLOGIAJ BREMSOJ KONTRAŬ ESPERANTO "

8. GAZETARA SERVO

8.1. En De Pinte decidiĝis (vidu 2.4. de la antaŭa raporto) ke ni pripensu en ĉiu estrarkunsido kion sugesti al Herman kaj Annie por ensendi al la gazetaro.
Por decembro jam okazis io tiurilate i.a. pri la rilatoj de UEA kun UNESKO kaj pri la 150-a datreveno de la naskiĝo de L.L. ZAMENHOF.

8.2. HVI kaj TD kunmetis (ankoraŭ ne tute kompletan) liston de kunlaborantoj.
Tiu listo estos sendita al Herman kaj Annie kiel eble plej rapide.

8.3. HVI raportas pri vizito al ESPERANTO 2000 - Leuven.
Tie S-ro Jacobs prizorgas apartan programeron, nome "HET GESPROKEN NIEUWS", en kiu li regule raportas pri Esperanto-novaĵoj.
Jen bonega iniciato imitenda.
ID proponos al LVS (kies prezidanto li ankoraŭ estas) samkiel al la aliaj grupoj fari ion saman.

8.4. HVI raportas ke Genta pupteatra grupo (TAPTOE GENT) partoprenos la venontjaran PIF en Zagreb kun la helpo de Esperantistoj.

9. INTERGRUPA AGADO

9.1. ID proponas liston de nepluŭaliĝintaj membroj por detala ekzameno.
Ĉiu inter la ĉees-tantoj jam donas sian vidpunkton pri de ili konataj

malaperintaj membroj respondante demandoj kiel (laŭ indikoj de AS)

- kial ili ne plu estas membro ?
  - loka aŭ regiona kialoj
  - ŝparemo
  - malinteresiĝo
  - personaj konfliktoj
  - deadmono de la ĉirkaŭaĵo
  - manko de kontakteblecoj

9.2. La demandoj kiuj la ĉeestantoj ne povas respondi, rondiros la la diferencaj grupoj por pli-kompletigo.
Ni denove prikonsideros la lison post kompleta plenigo.

10. BALO

TD : Ĉu nova balo estu organizita ?
ID : Ĉu ĝi valoras la energion ? (publikado en- kaj eksterlanda, gastigado ktp.)

Proponite estas kombini la balon kuj aliaj okazoj (arigo de homoj)
Provizore la problemo restas nedecidita.

11. INSTITUCIO HODLER

IH ankoraŭ ne respondis al nia kontraktpropono. Ni provizore daŭrigos laŭ la nuna sistemo.

12. LABORPLANO 1985

| | | |
|---|---|---|
| 05 01 | ) | 01 06 | 
| 02 02 | ) estraraj kunsidoj | 07 09 |
| 02 03 | ) | 05 10 estraraj kunsidoj |
| 16 03 : ĝenerala jarkunsido | | 02 11 |
| 20 04 : (en la Bruĝa kongreso) | | 07 12 |

13 DIVERSAĴOJ

UZITA PAPERO

Uzita papero estas stokata de la Esperantocentro por plu vendado.
Ĝi povas alporti al FEL ĝis po BF 2,- kilograme.
Do,
bonaj komprenantoj ...

Fino de la kunsido : 15.30 Prezidis ID

Protokolis : JB



KOMUNIKOJ.

Nia prezidanto, Ivo Durwael, pretas ripeti sian prelegon rilate al la Zamenhofa Festo, kiun li prizorgis antaŭ LA VERDA STELO je 14 12 1984, en aliaj kluboj.
Sufiĉas kontakti lin por pliaj detaloj kaj eventualaj kondiĉoj.

Je 01 12 1984, S-ro Rik de Roover donis en LA VERDA STELO, Antverpeno, elstare interesan prelegon pri "Braille", la blinda skribsistemo.
Li pretas fari la samon en aliaj grupoj.
Interesitoj kontaktiĝu ĉu kun li persone, ĉu pere de LA VERDA STELO.

Nova Esperanto-kurso startis je 15 11 1984 en Mechelen.
Iniciatinto : Ward SCHALLENBERGHS
Loko : " TSENTROEM", Oude Brusselsestraat 28, Mechelen
Kursotago : Jaŭdo ekde 20.00 h.

---

## UNUIĜINTAJ NACIOJ KAJ UNESKO

La Rezolucio, akceptita de la Pleno de la Ĝenerala Konferenco la 10-an de decembro 1954, kiel ĝi aperas en la dokumento *Rezolucioj de la Ĝenerala Konferenco de Unesko*, Montevideo, 1954 [6], tekstas:

*Rezolucio*

IV. 1.4.422 La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favore al Esperanto;
IV. 1.4.4221 Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;
IV. 1.4.4222 Rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko;
IV. 1.4.4223 Notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;
IV. 1.4.4224 Komisias la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.

6. Records of the General Conference, Eighth Session, Montevideo, 1954, *Resolutions*, Res. IV.1.4.422, p. 36.

La rezulton de la voĉdono salutis varma aplaŭdo de la granda plimulto de la delegacioj kaj, eĉ pli, de la ĉeestantoj en la galerioj. La urugvaja gazetaro kaj radio alportis la novajon jam la morgaŭan matenon. La taggazeto *Tribuna Popular* amplekse informis sub la titolo „*Triunfo de Esperanto*". En la postaj tagoj praktike ĉiuj radiostacioj de la mondo kaj ĉ. 2.000 gazetoj kaj periodaĵoj sciigis pri tiu historia decido de la Ĝenerala Konferenco.

### 22.3.5 Signifo de la Decidoj kaj Iliaj Sekvoj

22.3.5.1 *Konsultaj Rilatoj.* — En la tempo, kiam estis establitaj la konsultaj rilatoj inter Unesko kaj UEA, nome ekde la 8-a de decembro 1954 ĝis 1961, tiuj rilatoj estis nomataj „konsultaj aranĝoj". Organizaĵo kun tiaj aranĝoj rajtis sendi, sen speciala invito, observanto(j)n al ĉiu sesio de la Ĝenerala Konferenco. Tia organizaĵo povis esti invitita sendi siajn specialistojn al kunvenoj, teknikaj konferencoj aŭ seminarioj rilatantaj al demandoj, kiuj ĝin interesas. Laŭ la cirkonstancoj, organizaĵo kun konsultaj aranĝoj povis sendi al tiaj kunvenoj kaj konferencoj sian opinion ankaŭ skribe. La aliaj rajtoj de organizaĵoj kun tiaj aranĝoj estis: la rajto ricevi ĉiujn dokumentojn kaj nekonfidencajn informojn de Unesko; la rajto sendi skribajn raportojn kaj sugestojn pri la programo de Unesko, kion la Ĝenerala Direktoro devis diskonigi al la membroj de la Ekzekutiva Komitato, al la Ŝtatoj-Membroj kaj al la Ĝenerala Konferenco. Ĉiuj menciitaj rajtoj kaj privilegioj povis esti resumitaj je la fundamenta rajto esti konsultita en ĉiuj aferoj koncernantaj la kompetentecon kaj sferon de agado de la koncerna organizaĵo. En la kazo de UEA tio praktike signifis la rajton doni sian opinion pri ĉio, kio koncernas la lingvan demandon en internaciaj rilatoj.

Siavice, asocio kun konsultaj aranĝoj devis helpi, laŭ siaj eblecoj, la efektivigon de la programo de Unesko; inviti tiun organizaĵon sendi sian observanton al la kongresoj kaj konferencoj de la asocio; liveri al Unesko informojn pri siaj agadoj kaj sendi al ĝi siajn publikaĵojn kaj periodaĵojn; doni informojn al Unesko pri ĉiuj ŝanĝoj en la nombro de la membraro kaj pri la diversaj funkciuloj; sendi al Unesko ĉiujare raporton pri la menciitaj punktoj.

Kiel vidiĝas el la Raportoj de la Estraro, regule publikigataj en la *Jarlibro* de la Asocio, UEA ĉiam rigore observis siajn devojn kaj, se necese, energie postulis siajn rajtojn.

(Pliaj detaloj estas troveblaj
en ESPERANTO EN PERSPEKTIVO)